

EKO 2025

Bleko
kun eĥo

EKO 2025-09. Februaro 25. Pezo: 300 KB

UEA aliĝis al la Komisiono de UN pri Virina Agado

Tiun paŝon mi povis fari nome de UEA post interkonsiliĝo kun Humphrey Tonkin, ĉefrepresentanto de UEA en Novjorko. Tiu komisiono laboras ĉefe en Ĝenevo. En la diversaj servoj al la membroj estas sendi tekston por ilia novaĵletero. Tie mi anoncos nian seminarion de la 8-a de marto, kiu titoliĝas *Esti virino*. Vidu [Esti virino | Eventa Servo](#). [Trovu la programon en Eventaservo tie: <https://eventaservo.org/e/e3361b>](#). Ni plu laboru ade, arde kaj efike.

Mireille Grosjean

ILEI invitas arde Beograden

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) invitas vin al la **58-a kongreso de ILEI** (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en Beogrado, de la 19-a ĝis la 26-a de julio. Jen neforgesebla okazo por kunveni, lerni kaj ĝui la unikan etoson de la serba ĉefurbo. La ĉefa temo de la kongreso kaj ĝia simpozio estas: **Artefarita intelekto kaj lingvolernado**. Ĉiu trovos ion por si. Vi renkontos malnovajn kaj novajn amikojn, lernos ion novan kaj lernigos al la aliaj ion. Abundos la turisma kaj kultur-arta programo en la amika etoso de la ĉefevento de ILEI. Ni bonvenigas ĉiujn de iu ajn lingvo-nivelo.

- Retejo de la kongreso: 2025.kongreso.org (alklaku la logotipon de ILEI por pluiiri al la ĉefa paĝo) aŭ 2025.kongreso.org/ilei-chefa.html
- Rekta ligilo al la aliĝilo: 2025.kongreso.org/alighilo.html
- Eventaservo: eventaservo.org/e/ILEI-58

Esperantistoj aktivas en Komoroj – jen kontakto

Antaŭ kelkaj tagoj mi (François Lo Jacomo) ekhavis kontakton kun la esperantisto loĝanta en Komoroj. Jen lia retadreso : alimzecomoros@gmail.com
Dum nia babilado li diris, ke tie estas pliaj esperantistoj krom li.

Espoir Ngoma Kasati, Membro de Afrika Komisiono de UEA

Vinilkosmo kaj AI-muziko

Ni invitas vin legi artikolon kompilitan ĉi tie en nia blogo
<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/425-kial-ai-generita-esperantomuziko.html>
Jen malfermita debato pri AI-generita Esperanto-muziko.

Teo kaj Amo en Italio

Jen la unua video de nia tradicia evento *Teo kaj Amo* en la Ĉina Muzeo de Parmo, en kunlaboro kun la grupo de Tianjin. Ĉi-jare la subtitolo estis *Floraj Ludoj*, ĉar ni parolis pri

floroj kaj ĝardenoj kaj havis poemojn pri floroj en la Itala kaj Esperanto. Partoprenis iom pli ol 40 homoj. Komence mi iom instruetis Esperanton per la lumbildoj de Anna Löwenstein. Du pliaj videoj sekvas. Jen la unua: [Teo kaj Amo 3: Floraj Ludoj \(1\)](#)
Jen la poemoj pri floroj: [Floraj Ludoj/Ludi Floreali: la poemoj/le poesie](#)

Laura Brazzabeni kaj mi prezentis ILEI dum la dimanĉa forumo de IKEF: [Pri ILEI prelegita de Alessandra Madella \(Italio\)](#).

Printempo, sed ne en Parizo

La Eo-Kulturdomo Greziljono invitas vin al la 13-a kursaro PRINTEMPAS kun kvar famaj instruistoj kaj preparo de KER-ekzameno de la 18-a ĝis la 27-a de aprilo. Vidu [gresillon.org/p](#). Sekvas la ĥora (korusa) renkonto de Interkant, BEMI-semajno de biciklaj promenoj kaj grupo por disvolvi sian kreivon de la 27-a de aprilo ĝis la 3-a de majo. Vidu [gresillon.org/k](#). Prezroj troveblas en la aliĝilo [gresillon.org/al](#), eblas redukto por homo kun modestaj rimedoj kaj redukto kontraŭ helpo. Ni provas organizi kunveturadon. Kontakto nin per retmesaĝo 'kastelo' ĉe [gresillon.org](#) aŭ telefono 02 41 89 10 34 (respondilo) aŭ 0651242423 (SMS).

Bert ŜUMAN

Stela intervjuo ondas al vi

En la decembra (vintra) eldono de *La Ondo de Esperanto* aperis intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski kun **Eszter (Stela) Besenyei-Merger** (prononcu: Béŝenjej-Merĵé), la Esperantisto de la Jaro 2024. Ĉi tiu intervjuo aperis ankaŭ en la samtitola novaĵretejo ĉe <https://sezonoj.ru/2025/02/stela/>.

Ekzamenoj per distanca universitato

Hispana Esperanto-Federacio publikigis jenan novaĵon:

<https://www.esperanto.es/eo/liberaj-ekzamenoj-de-esperanto-en-uned/>

Nun, kiam la estonteco de la ekzamenoj de *ELTE Origo Nyelvi Centrum* en Hungario estas duba, estas ĝojige ke restas universitataj ekzamenoj de nia lingvo, eĉ se nur je niveloj A2 kaj B1. Kompense, ekzistas eblo ekzameniĝi en kelkaj eksterlandaj lokoj, kion laŭ mia kompreno ne faras Origo. Jen informo pri universitato UNED:

<https://canal.uned.es/video/5b430ba0b1111f1f668b456a>

Benina beno

En decembro 2024, lanĉiĝis speciala Esperanto-agado ĉe ŝtata mezlernejo en Lokossa. La agado estas speciala pro tio ke ĝi entenas enkondukon al legopovo en naciaj lingvoj. La lanĉceremonio okazis sub gvido de la Estro pri lego-skribopovo en naciaj lingvoj. Informkampanjo, okazigita pri la agado kelkajn tagojn antaŭe malfermis la vojon al aliĝado. La celgrupoj estas unua- kaj dua-jaraj gelernantoj unuflanke kaj tiuj de kvina- kaj sesa-jaraj aliflanke. Aliĝis 532 personoj, el kiuj 273 virinoj.



Lingvaj homaj rajtoj

Mi anoncas la publikigon de la speciala numero de *Language Problems & Language Planning* pri la temo 'Ĉu lingvaj homaj rajtoj ekzistas?' La numero enhavas kelkajn kontribuojn el la Nitobe-Simpozio de Torino 2023 kun-organizita de CED tuj antaŭ la Universala kongreso. La artikoloj estas aŭ en la franca aŭ en la angla, sed ĉiuj resumoj haveblas en Esperanto: <https://benjamins.com/catalog/lplp.48.2>

Michele Gazzola, Ulster University www.michelegazzola.com

Beaucaire rememore

Antaŭ cent jaroj, la 7-an de februaro 1925, naskiĝis Louis Beaucaire (1925-1983), franca librovendisto kaj esperantisto, kiu ekde 1950 loĝis en Berlino; aŭtoro de tri leĝeraj libroj verkitaj sprite kaj belstile. (Re)legu lian 'maldecetan epizodon' kun la titolo "Kiel mi fariĝis kunfondinto de UEA" ĉe <https://sezonoj.ru/2020/02/beucaire/>.

76-a IFEF-kongreso en Žilina, Slovakio

Vi povas trovi en la retejo je la adreso: <https://ifk.ikso.net/>. Aliĝilon vi trovos rekte je la adreso: <https://ifk.ikso.net/aligxilo/>. **SMG:** Žilina estas grava nodo por la slovakaj fervojoj

Ladislav KOVÁŘ

Kjara en Kaŭno

La itala kantaŭtorino, gitaristo, kantisto, komponisto kaj diskproduktanto Kjara (Chiara Raggi) koncertos ĉi-somere en Kaŭno kadre de la kultura programo de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Jen plia kaŭzo por aliĝi al BET-59. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/01/bet-167/>

Stipendio por esploristoj

Doktora stipendio estas por esplori la temon *Lingva Politiko kaj Ŝtataj Krimoj* ĉe Ulstera Universitato, Belfasta kampuso. La doktora tezo celas esplori la rilaton inter lingvopolitiko kaj ŝtataj krimoj, kaj en la nuntempo kaj en la pasinteco, precipe en konfliktaj kunteksto. Kandidatoj estas invitataj studi aktualajn lingvajn politikojn, kiuj povas esti konsiderataj kiel ŝtata krimo, iliaj naturo, organizo, efektivigo kaj ideologia fono. Alternativo estas studi la hodiaŭajn lingvajn politikojn, kiuj celas rebonigi ŝtatajn krimojn faritajn en la pasinteco. Ĝi estas interfaka temo de studo kiu ampleksas publikan politikon, socilingvistikon, krimologion kaj ekonomion.

Kandidatoj estas kuraĝigataj kaj bonvenaj el ĉiuj ĉi tiuj kampoj. Por pliaj informoj pri la temo kaj la kvalifikaj kriterioj, vizitu ĉi tiun paĝon:

<https://www.ulster.ac.uk/doctoralcollege/find-a-phd/20-applied-social-and-policy-sciences/1679874>.

Michele Gazzola, Ulster University, www.michelegazzola.com

S-ro Semio agegas en Zhaozhiang

Granda klaso da lernantoj sekvis la lecionon kun forta intereso. Kelkajn vortojn kaj simplajn frazojn en Esperanto ili jam konis danke al la pretiga laboro de la instruistino Suna. S-ro Semio rakontis al ili pri la



historio de la internacia lingvo en Ĉinio kaj en la mondo, kaj li prezentis ankaŭ la bazajn gramatikajn regulojn. Choi Manwon el Koreio alparolis la lernantojn en la korea kaj en Esperanto kun ĉina traduko, kaj mi prezentis salutojn en diversaj lingvoj kaj instruis kelkajn simplajn demandojn kaj respondojn. Legu pli ĉe:

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/agado-en-zaozhuang-r462/>

Interlingvistoj servataj en Esperanto

Nun haveblas la numero 130 de Informilo por Interlingvistoj (Ipl)

kaj ĝia anglalingva versio, Ipl - estas eldonataj de la [Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj \(CED\)](#). Niaj novaĵletoj disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliajn utilajn informojn por esploristoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri lingvopolitiko, Esperantologio kaj rilataj temoj. Trovu ĝin ĉe: <https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2025/01/Ipl130.pdf>

===== vortoj: 1170 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvar numeroj de 2024 aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.